



KAMPANJAJ NOVAĴOJ

Unuiĝintaj verdulaj partioj eŭropaj

KAMPANJAJ NOVAĴOJ DE EŬROPAJ VERDULOJ

5a ELDONO –

Novaĵoj de la naciaj partioj en eŭropa balotado de la 4a ĝis 7a de JUNIO 2009

Bonega rezulto por eŭropaj verduloj plifortigas la grupon GREENS/EFA per almenaŭ 10 seĝoj

Entute la eŭropa verdula partio havis bonegan rezulton en la balotoj por Eŭropa Parlamento. Entute 46 verdulaj EP-anoj estas elektitaj, altiĝinte de 35. La grupo Verduloj/EFA nun probable havos 53 EP-anojn (46 verdulajn kaj 7 EFA-ajn EP-anojn), altiĝinte de 43, kvankam la ĝusta formado de la Grupo ankoraŭ estas konfirmenda

<http://europeangreens.eu/menu/news/>

Verdulaj balotrezultoj

Lando	Partio	procento	seĝoj
Aŭstrio	Die Grünen	9.5%	2
Belgio	Ecolo	23.26%	2
Belgio	Groen!	7.9%	1
Bulgario	Zelenite	0.72%	0
Cipro	Cyprus Green Party	1.5%	0
Ĉeĥio	Strana Zelenych	2.05%	0
Danlando	SF	16.1%	2
Estonio	Eestimaa Rohelised	2.73%	0
Finnlando	Vihreat	12.4%	2
Francio	Europe Écologie/Les Verts	16.2%	13
Germanio	Bündnis90/Die Grünen	12.1%	14
Grekio	Ecologistoi Prasinoi	3.48%	1
Hungario	LMP	2.6%	0
Irlando	Comhaontas Glas	1.89%	0
Italio	Federazione dei Verdi	3.2%	0
Latvio	Latvijas Zala Partija		
Luksemburgio	Dēi grēng	17.4%	1
Malto	Alternattiva Demokratika	2.34%	0
Nederlando	Groenlinks	8.9%	3
Nederlando	De Groenen	0.2%	0
Pollando	Zieloni 2004	2.4%	0
Portugalio	Os Verdes		0
Slovakio	Strana Zelenych	2.11%	0
Slovenio	SMS	1.9%	0
Hispanio. Katalunio	ICV	3.73%	1
Hispanio	Los Verdes	0.56%	(1)
Svedio	Miljöpartiet de Gröna	10.9%	2
UR/ Anglio. Kimrio	The Green Party of England and Wales	8.7%	2
UR/ Skotlando	Scottish Green Party	7.3%	0
ENTUTE			46+(1)

FRANCIO

EUROPE ECOLOGIE/les Verts havis bonegan rezulton per 14 elektitaj EP-anoj.

La plej juna aĝas 29 jarojn.

<http://www.liberation.fr/politiques/06011000-cohn-bendit-a-libe-je-ne-suis-pas-un-tueur>
kaj ligiloj al artikoloj de 9.6.09

<http://www.liberation.fr/politiques/06011003-cohn-bendit-a-libe-pour-etre-president-il-faut-etre-un-tueur>

<http://www.parismatch.com/Actu-Match/Politique/Actu/Europeennes-L-UMP-et-Europe-ecologie-triomphant-102612/>



SVEDIO

Maria Wetterstrand (partiestro) kun Carl Schlyter EP-ano kaj Isabella Lövin EP-ano. Miljopartiet de Gröna estris sukcesintan kampanjon kaj estas tre kontentaj pri siaj balotrezultoj. (pliaj informoj venu de Anna-Karin)

SLOVENIO

Malgraŭ la granda kampanjo, dum kiu la kandidatoj kaj aktivuloj longe kaj forte batalis, SMS (la slovenia junulara partio) atingis iomete malpli ol 2%. Tio ne sufiĉis por havi EP-anon. Ili bezonas pli ol 9% de ĉiuj voĉoj por sendi slovenian verdulan reprezentanton al EP. Unuiĝintaj Verduloj (Združeni Zeleni) akiris eĉ malpli multe, 0,64%, kiu montris, ke la balotantoj rekonis SMS-on kaj ne ilin kiel Eŭropajn Verdulojn malgraŭ ilia nomo. Tamen ili sukcesis kaŝi al la publiko la veron pri la reala dekstrulareco de sia politiko. (ĉu ni devas diri ĉi tion?) La dekstrulara SDS, la plej granda opozicia partio gajnis plej multajn voĉojn kaj havas 2 seĝojn. La plej granda parlamenta partio, la maldekstrulara SD ankaŭ havas 2 EP-anojn. Du aliaj maldekstraj partioj, LDS kaj Zares, po akiris 1 seĝon. Unu seĝon akiris la dekstrulara NSi, kiu ne eniris la parlamenton dum la lastaj naciaj balotadoj, sed akiris la bonan rezulton precipe pro la subteno por sia aktuala EP-ano Lojze Peterle. Do entute, la maldekstrularaj partioj akiris 4 seĝojn kaj la dekstrularaj partioj akiris 3. La nombro da voĉdonintoj estis malalta - 28%. Definitivaj rezultoj de la slovenia voĉdonado troveblas en la retejo de Nacia Voĉdona Komisiono:

<http://volitve.gov.si/ep2009/>

NEDERLANDO

Groenlinks bonege sukcesis per akiro de 3 seĝoj en la balotoj -



Judith Sargentini



Bas Eickhout




Marije Cornelissen

MALTO

Malgraŭ voĉdonaj prognozaj inter 5,5 kaj 6,5% kaj vigla kaj dinamika kampanjo, la maltaj verduloj akiris 2,3 %, pro Kristandemokrata protesto per nevoĉdonado aŭ voĉdonado rekte por Laborista Partio. Bedaŭrinde, rezulte de tio, Arnold Cassola anoncis sian decidon stari demisii kiel partia prezidanto ekde oktobro

POLLANDO

Bedaŭrinde estis absoluta triumfo de la dekstruloj en Pollando. Malgraŭ tre bonaj kandidatoj kaj bona videbleco Polaj Verduloj akiris nur 2,4% Civita Platformo (EPP) - 44,39% - 25 EP-anojn; Juro kaj Justeco (UEN) - 27,41% - 15 EP-anojn Maldekstra Demokratia Alianco (PES) - 12,33% - 7 EP-anojn; Popola Partio (EPP) - 7,3% - 3 EP-anojn



CIPRO

La kandidatoj penegis kaj estis bona ŝanco por multaj Verduloj. En Cipro Verduloj akiris 1,5%. Tio estas preskaŭ duoblo de la voĉoj en 2004. Tamen por Cipraj Verduloj la eŭropaj balotadoj ŝajnas malsukcesintaj jam de la komenco, ĉar Cipro elektis nur 6 EP-anojn kaj tial 10% estis la minimume bezonata procento!

NOVAĴOJ EL FINNLANDO

Heidi Hautala aliĝos al Satu Hassi ĉe la EP. Finnaj Verduloj fidis, ke ili akiros ĉi tiujn du seĝojn sed devis atendi ĝis 95 % de la voĉdonoj estis kalkulitaj por esti certaj! Ĝis tiam la prognozo atribuis al la verduloj nur unu seĝon, unue Satu estis gajnanta, kaj lastmomente Heidi, kiam la ĉefurbejaj voĉdonoj estis kalkulitaj. Ĉi tiu sukceso estas dankinda al fortega kandidatlisto kaj penado, la kampanjoj estis ĉiuj ege pozitivaj. Entutaj rezultoj: Konservativuloj (EPP) 3 seĝoj (-1), Centra partio (ALDE) 3 (-1), Socialdemokratoj 2 (-1), Verduloj 2 (1), alianco de Veraj Finnoj kaj Kristandemokratoj 2 (2), Sveda Popola Partio 1 (kiel antaŭe). Do ĉiuj grandaj partioj perdis kaj la populista dekstrulara partio Veraj Finnoj ankaŭ helpis la Kristandemokratoj reveni en EP. Plia informo, elektitaj EP-anoj:

http://yle.fi/vaalit/tulospalvelu/elected_candidates.html



MESAĜO EL ALBANIO

"Albaniaj Verduloj gratulas Eŭropajn Verdulojn pro la bonega rezulto en ĉi tiuj balotadoj. Tiu sukceso instigos verdulojn tutmonde kaj speciale junajn kaj malgrandajn partiojn, kia Albania Verda Partio. Albaniaj Verduloj estas aparte entuziasmaj pro la gajno de s-ro Michalis Tremopoulos, kiu reprezentas ne nur Verdulan Grekan Partion sed ankaŭ Balkanajn Verdulojn "

GRATULMESAĜO EL TURKIO

" Karaj amikoj, Ni ĝojas pro la ekscitaj novaĵoj venanta de niaj verdulaj amikoj en Eŭropo. Gratulojn al vi ĉiuj! Kiel ni diradas, „la estonteco estas verda“ kaj vi faris bonegan laboron pasintsemajne montrante al ĉiuj la ĝustan direkton. Kun nia plej elkoraj salutoj el Turkio," Ahmet Atıl Asıcı

Sekretario pri internaciaj rilatoj de Verda Partio de Turkio

GREKIO

Historia momento por Oikologioj - Prasinoj pro la elekto de la unua greka verdula EP-ano

Michalis Tremopoulos. Nia partio sukcesis akiri 3,49% de la entutaj voĉdonoj. Ni ankaŭ sukcesis atingi la komencajn celojn de nia kampanjo por reprezentado en la parlamento. Dimanĉe la civitanoj de nia lando sendis politikan mesaĝon, ili volas ŝanĝi la klimaton kaj starigi solvojn por la medio, socio kaj ekonomio centre de la politiko. La rezulto de la balotado de Oikologoi - Prasinoi estis surbaze de fluo de konscia voĉdonado favore al verda politika centro en nia lando.



UNUIĜINTA REĜLANDO

La verdula partio en Anglio kaj Kimrio plialtigis sian procentaĵon da voĉoj per pli ol triono sed ne plialtigis sian nombrom da seĝoj - ĝi tenas unu en Londono kaj unu en sudorienta Anglio - por tria mandato per 8,6% de la entute donitaj voĉoj, altiĝinte de 6,2% en 2004. En la orientanglia regiono la partio atingis sian pli altan voĉnombron en Norwich kaj apenaŭ maltrafis la akiron de seĝo. En sudokcidenta kaj sudaorienta Anglio la partio venis kvaravice, venkante Laboristan Partion en kvina loko. En la sudorienta voĉdona distrikto la procentaĵo de verdulaj voĉoj iris de 8% al 12%, kaj la partio superis la revenan sondadon en Brighton kaj Hove. En Skotlando la Skota Verda partio atingis sian „iaman plej bonan rezulton“ de 7,3% sed ne akiris seĝon.



Listo de EP-anoj laŭ membroŝtato

Aŭstrio

Ulrike Lunacek

Eva Lichtenberger

Belgio

Bart Staes

Isabelle Durant

Philippe Lamberts

Danlando

Margrete Auken

Emilie Turunen

Finnlando

Satu Hassi

Heidi Hautala

Francio

François Alfonsi (Sud-est)

Sandrine Bélier (Est)

Malika Benarab-Attou (Sud-est)

Jean-Paul Besset (Massif Central-Centre)

José Bové (Sud-ouest)

Pascal Canfin (Ile-de-France)

Daniel Cohn-Bendit (Ile-de-France)

Karima Delli (Ile-de-France)

Hélène Flautre (Nord-ouest)

Catherine Grèze (Sud-ouest)

Yannick Jadot (Ouest)
Eva Joly (Ile-de-France)
Nicole Kiil-Nielsen (Ouest)
Michèle Rivasi (Sud-est)

Germanio

Rebecca Harms
Reinhard Butikofer
Heide Ruhle
Sven Giegold
Barbara Lochbihler
Michael Cramer
Ska Keller
Werner Schulz
Helga Truepel
Martin Hausling
Franziska Brantner
Jan Philip Albrecht
Elisabeth Schroedter
Gerald Hafner

Grekio

Michalis Tremopoulos

Luksemburgio

Claude Turmes

Nederlando

Judith Sargentini
Bas Eickhout
Marije Cornelissen

Hispanio

Pura Peris
Raul Romeva

Svedio

Carl Schlyter
Isabella Lövin

Unuiĝinta Reĝlando

Jean Lambert
Caroline Lucas

Wiertzstraat 31, B1050 Bruselo, Belgio | T: +32 2 622 07 20 | F: +32 2 626 07 29 |
europeangreens@europeangreens.org
www.europeangreen.eu | www.europeangreens.ning.com | www.twitter.com/greencampaign09
www.europeangreens.eu/facebook | www.youtube.com/europeangreens